الله أكبر

دار تبليغ الإسلام

DAR TABLIEGH-EL-ISLAM

MOHAMMAD TAUFIEK AHMMAD

محمد توفيق أحمد المهندس

أسس سنة ١٣٤٨ - ١٩٢٩ في سويسرا

المركز الرئيسي القاهرة مصر

# ISLAMO ĈIES RELIGIO

DE

**Mohammad Taufick Ahmad**

(Ing. Dipl.)

**Dar Tabliegh El-Islam**

201 - A, Omar Lotfi Street,

Sporting, Alexandria, Egypt,

Free Islamic books from: CIMS 834 Alexandria, Egypt

بسم الله الرحمن الرحيم

( ربنا افتح بيننا وبين قومنا بالحق وأنت خير الفاتحين )

( قرآن كريم )

رقم الايداع ٣٥٥٣

Karaj gefratoj

Cu vi iam pensis pri religio? Kiom da diversaj opinioj oni havis pri ĝi? Cu vi rimarkis la malamikecon kiu regas inter la popoloj ?

Ĉiu homo kredas, ke li praktikas la veran religion, eĉ se lia Dio estas ŝtono.

Ĉu vi rimarkis, kiom fanatikaj estas multaj homoj pri sia kredo? Mi estas certa, ke viaj pensoj jam okupiĝis pri tio, kaj ke vi trovis, ke la sola bona stato estus, ke ekzistu nur unu religio, komprenata de la tuta homaro.

Ĉiu homo devus mem senti, sen ia instruo, ke li devus vivi laŭ la jenaj tri ĉefprincipoj:

Kredi nur unu Dion; disvastigi homamon ĉe sia homfrataro; kaj kredi, ke Dio sendis siajn profetojn por instrui al la homaro ĉi tiujn du sanktajn ĉefprincipojn.

Se vi pensas pri tiuj du sanktaj kondiĉoj, vi demandos al vi, se vere ekzistas tia religio. Jes! Jam de la komenco de la mondo ekzistas tia religio, inspirita de Dio. Kun tiu unusola religio Dio sendis Siajn profetojn, do ĝi estas la religio de Dio; sed la homoj erare kaj diverse nomis ĝin laŭ la profetoj en ĉiuj epokoj. Tiu erara nomado kondukis al miskompreno kaj fanatikeco inter la diversaj homelementoj.

Tiu divido de la unusola religio kaŭzis, ke la homaro ne plu povas trovi la veran religion. Islamon oni nomis Mahometanismo laŭ la profeto Mahometo, same kiel

ankaŭ aliajn religiojn oni nomis laŭ iliaj profetoj, kvankam ĉiuj rekonas nur unu celon: la kredo al nur unu Dio.

La vorto Islamo signifas: paco inter homoj, kaj humileco antaŭ Dio.

Kvankam ne misiisto, mi sentas mian devon klarigi mallonge la signifon de ĉi tiu religio; sed se oni pensas ke aliaj kredantoj ne komprenas Islamon kaj ĝian instruon, la antaŭjuĝoj kaj kalumnioj kontraŭ tiu religio releviĝos kaj ni atingos nenian gravan rezulton.

Ni jam konstatis, ke Islamo signifas sindediĉon al Dio, kaj pacon kun si, kun la homaro, kaj kun Dio.

Tion instruas la Korano: ke oni devas fari bonon al aliaj kaj per tio sin purigi.

Mahomoto estis lasta sed ne la sola profeto de Islamo. La Islamano kredas je ĉiuj profetoj de ĉiuj epokoj: je Abrahamo, je Moseo, je Jesuo. Dio sendis Siajn profetojn al la homaro por diri, ke ĝi plenumu Lian volon, kaj vivu puran vivon.

La Sankta Skribo de Islamo estas la Korano, kiu enhavas la veran instruadon de ĉiuj Sanktaj Skriboj.

Islamo instruas al la Islamano: Kredi je unu Dio, la anĝeloj, la Sanktaj Skriboj, la Profetoj, la Releviĝo post la morto kaj, la lasta juĝo.

Oni parolas erare pri fatalismo kaj antaŭdestino en Islamo; la Islamano kredas je kompleta distingo inter la bono kaj la malbono: ĉio kreita de Dio estas bona, uzata

laŭ sia vera celo, kondukas al feliĉo; sed se ĝi estas misuzata, ĝi kondukas al la malbono kaj al mizero.

Ĉiuj Islamanoj preĝas al sia unusola Dio, kiu estas la ĉiopovulo, la ĉiosciulo, la justegulo, kaj la Solhelpanto de la tuta mondo.

Dio nek naskiĝis, nek naskigis filon aŭ filinon. Li estas nedisigebla. Li estas la lumo de la Ĉielo kaj la Tero. Li estas kompatema kaj pardonema. Li estas la komenco kaj la Fino. Li estas eterna.

Jesuo ja nomis Dion lia Patro; tamen, tio ne signifas efektive ke Li estas lia Patro: ĝi estas nur signo pri la boneco kaj pardonemo de Dio.

Ĉie estas Dio, kaj kiam Jesuo preĝis al Dio en Ĉielo Li ne volas diri, ke Dio estas sole en Ĉielo; tio ja estas nur signo pri la alteco de Dio.

Kredo kaj Faro

Kredo sen faro estas senviviĝo; kredo sola ne sufiĉas tiom longe, kiom oni ne aliformigas ĝin en faron. La Islamano kredas ke li respondumos pri la propraj faroj aŭ en ĉi tiu mondo aŭ en la venonta. Ĉiu Islamano portas la propraja ŝarĝojn, kaj neniu povas alpreni respondecon pri la pekoj de aliaj.

La Pozicio de Virino en Islamo

Viroj kaj virinoj konsistas el la samaj elementoj, posedas la saman animon, kaj proviziĝas je egalaj kapabloj pri intelektaj kaj moralaj faroj.

Islamo trudas al viroj kaj virinoj la saman respondeccon; kaj taksas la virinon kapabla ĝis ia grado la problemojn de la vivo. Ŝi kaj la viro devas agi kune dum sia kunvivo sur la tero laŭ la principo, ke ĉiu el ili havas sian difinitan rolon.

La natura rolo de la Islamanino, kiel edzino, estas prizorgi la aferojn de sia edzo kaj, kiel patrino, ŝi devas prizorgi siajn idojn; alivorte ŝi devas okupiĝi ĉefe pri bona mastrumado kaj ŝparemo en la domo, ĉar tiu estas ŝia esenca devo, kaj ne pasigi sian vivon en oficejoj kaj fabrikejoj.

Ni povas diri el vera Islama vidpunkto, ke nia virino estas ĉie alte estimata kaj respektata; tamen, se kelkloke en la oriento oni metas ŝin en malaltan lokon, tio rezultigas el la fakto, ke en tiuj lokoj la ordonoj kaj instruo de Islamo ne estas fidele praktikataj.

La malbonaj ideoj pri Islamo, kiujn eldonas en siaj verkoj iuj fanatikaj verkistoj, estas malveraj, kaj tiuj agas mallaŭdinde, elmetante falsajn opiniojn, kiujn ili disvastigas tra la tuta mondo.

Kiu volas juĝi honeste, tiu devas informiĝi pri la fundamenta instruo de la afero juĝata, por ke li havu ĝustan opinion pri ĝi; tamen tiuj fanatikuloj ŝajne volas servi la koloniadon, ĉar ili nenion diras pri la persekutado kiun la okcidento trudis al la senarmila Oriento.

En la tempo, kiam ili atakas la sklavecon, ili sam-

tempe ĝin praktikas sub la masko de reformo kaj protekt‹
je la tiel nomataj "sovaĝuloj"

Rompi la vivoforton de pura nacio estas facile, pe disvastigo de alkoholo kaj prostituado; ĉu tia ĉiam estu la reformo, kiun la Okcidento prezentas al la nacioj de la Oriento?

E g a l e c o / kaj F r a t e c o / en / I s l a m o

Islamo estas la religio de la unueco de Dio kaj la egaleco de la homoj antaŭ Li. Kvankam la homoj laŭnaske okupas malsamajn rangojn en tiu ĉi mondo, ili devas tamen kunagi, kaj inter ili devas ekzisti universala rilato reciproka. Ekzemple, la riĉuloj subtenas la malriĉuloj, kiuj siavice direktas sian atenton kaj laboron al iliaj taskoj. Ĉi tiuj reciprokaj devoj estas entenataj en tio, kion oni nomas la disciplino de la kreado.

Diferencigo inter nacioj kaj haŭtkoloroj, same kiel malsamaj kredoj, estas nekonataj en Islamo. La tuta hom-aro, laŭ la kompreno de Islamo, formas unu familion, en kiu sukcese kombiniĝas nigruloj kaj blankuloj en unu gr-anda frataro.

P e r s o n a / J u ĝ a d o

Islamo kuraĝigas personan opinion kaj respektas ĉies doktrinon en la limoj de ĝusta kompreno de la vera relig-io.

S c i e n c o

Islamo ordonas la studadon de la scienco, kaj opi-

nias sankta la progresigon de la scienco, ju ĝis la anĝeloj aŭ eĉ pli alten.

L a b o r o. "Pagu la laboriston antaŭ ol sekiĝas lia ŝvito." Tiuj estas la bone konataj vortoj de la Sankta Profeto. Ĉiu laboro kiu provizas la homaron je honesta vivrimedo, estas respektata; kaj mallaboremo estas peko.

D o n a c e m o.

La kapabloj de la homoj estas Didonacoj. Oni uzu ilin por la profito de la homaro; kaj ĉies devo estas vivi ankaŭ por aliaj kiel por si mem. Libero ne devas koni diferencojn. La Islamano estas ordonita de sia religio, ke li helpu la malriĉulojn kaj senhavulojn laŭ sia plaja povo. Krom la kredo al unu Dio, kaj similaj devoj, la Islamano havas ankaŭ la jenajn ĉefajn devojn:

1. Preĝo: por purigi kaj la korpon kaj la animon.
2. Fasto: por plisanigi kaj la korpon kaj la animon; korpa resanigo por refortigi kompaton al la homoj, bestoj kaj plantaĵoj, por pligrandigi la paciencon, kaj por plifortigi sian volon.
3. A l m o z d o n a d o. La kunsento de la riĉulo por la malriĉulo devas vekiĝi, kaj li devas doni 2.5% de siaj ensvezoj Tamen, li ne alkroĉu sin severe al tia sumo, sed lasu sian malavarecon flui libere.

Miaopinie seniu povas noi, ke sankta devo por ĉiu kredano estas subteni la malriĉulojn pro amo kaj kompato
4. P i l g r i m a d o / a l / M e k o

Islamano devus unufoje en sia vivo pilgrimi al Meko, se nur li povas trovi la rimedojn. Li devas adori nek templon, nek tombon, nek la profeton mem, sed nur mediti la sanktan signifon de Islamo kaj esti plena je dankemo al Dio -- tiel plenumante la celon de la pilgrimo.

La pilgrimantoj, kiuj venas el diversaj landoj, havas ankaŭ la okazon ekkoni unuj la aliajn; kaj tio estas grava faktoro en la kreo de la homa frataro.

La korano instruas, ke neniu estu devigata kredi ion ajn, malpermesas ĉian altrudon. Ĉiuj Islamaj militiroj havis kiel kialon nur la defendon de religio kaj sankta kredo.

Iam la regantoj en Islamaj landoj ekmilitis pro mondeca ambicio, kaj pro tio komencis fali de la supro de progreso, kiun atingis iliaj prapatroj per sekvado de la bona instruo de sia religio. La religio do ne estas riproĉinda pro tia defalo, ĉar ĝi kontraŭas tian militon.

Islamo donas kompletan liberecon pri penso kaj ago. Ĝi permesas al la homo kaj al la homa animo evolui al la bono kaj la nobleco; post atingo de tiu celo ekzistus nenia batalo; restus solaj paco kaj altiĝo de la sentoj.

Por esti Islamano, oni bezonas plenumi nenian ceremonion. Islamo ne estas nur interrilato, religio vasta, praktika kaj utila; ĝi ankaŭ plene harmonias kun homa naturo kaj la homaj emoj.

Ĉiu infano naskiĝas kun tiuj emoj; neniu bezonas al-

iformiĝi por esti Islamano.Agnoski Islamon malkaŝe kaj libere antaŭ la homoj estas simpla organiza formalaĵo.

Nun, el mia mallonga klarigo, vi vidas, kio estas Islamo, kaj kiom falsaj kaj partiecaj estas la opinioj de la malamikoj de Islamo!

Plezure mi restas preta por respondi ĉiujn demandojn kaj doni pluajn informojn.

Mi estas Islamano ( Pacano )

Tiu kredas je unu Dio, unu nedividebla, kiu estas ĉie, kaj ligita al neniu loko, kiu similas al neniu kaj al kiu neniu similas, la Ĉiokreinto.

Mi kredas je ĉiuj Liaj profetoj, sen ia distingo inter Moseo, Jesuo kaj Mahometo.

Mi atendas kaj petas subtenon, konsolon kaj pardonon pri ĉiuj pekoj, rekte de Dio, sen la helpo de iu ajn perulo.

Mi ne forgesas mian Dion eĉ unu momenton, mi sentas Lin en mi, ĉirkaŭ mi, kie ajn mi estu; Li estas la mezuro por ĉiuj miaj faroj.

Mi vivas laŭ la Dia instruo, sciigita per la Korano

Mi plenumas la principojn de Islamo: preĝas, fastas almozdonas, kaj entreprenas la pilgrimon al Meko.

Mi mortigas nek min mem, nek iun alian; Islamo ordonas al la homaro gardi la pacon.

Mi ne adultas, kaj mi evitas tenton kiu povos erarigi min, ĉar ni ĉiuj konscias, ke karno estas erarema.

Islamo malpermesas sociajn rilatojn kun la alia sekso. Ĉiu psikologo povas diri al ni efikon, se provas agi dece dum ekzemple dancado aŭ rilatado ia ajn kun la alia sekso; povas esti, ke ni sukcesos, sed ni tamen pagos tion kare.

La veraj ĝojoj estas tiuj kiujn ni akiras sen posta pento. Ilin karakterizas la altaj sentoj de la animo, kaj ilin protektas nia spirita forto. Ni trovas bonan ekzemplon en la historio pri la viro kiu havis la pekan deziron adulti; kies konscienco tamen tion ne permesis al li. Sed kiam li cedis al la tento drinki, li tion perdis konscion pri si, ke li cedis al la alia tento; kaj kiam la rajta posedanto de la malvirtulino sin trudis al li, li mortigis lin en lukto dum ankoraŭ sinforgeso sub la influo de alkoholo. El tio ni konkludas, ke ebriigiloj kondukas al la pekado.

Mi ne vetludas, eĉ ne por bagateloj. Vetludanto aŭ spekulanto ne respektas eĉ sian gajnon. Riski sian sorton je la hazardo de ludkartoj pruvas hontindan malfortecon de la karaktero.

Mi ne prunteprenas aŭ pruntedonas monon je interezo ĉar tio kondukas al ruiniĝo. Islamano rajtas prunti monon, se li povas, tamen, nur por helpi malriĉulon. Dume li rajtas akcepti garantiaĵon por certigi la redonon de sia mono; tamen, se temas pri objektoj, kiaj domaj utilaĵoj, estas al li malpermesite uzi iel ajn la garantiaĵon

Ni diras nenion malbonan pri aliaj, kaj ne rakontas historiojn pri miaj kunhomoj, je ties malprofito, al tiuj kiuj (laŭ frazo de la Korano) manĝas la karnoh de mortintoj: kio ŝajne volas diri, kiuj kalumnias forestantojn kiuj ne povas sin defendi.

Mi ne trompŝtelas la havon de vidvino aŭ orfo, se oni nomas min kuratoro; mi neniel profitas el ties senforteco.

Mi plenumas miajn promesojn kaj traktas ĉiun aferon kiun mi entreprenas, kun kompleta honesteco.

Nun, gefratoj, legu ĉi tion atente, kaj dediĉu parton de via tempo al studado de la paca instruo de ĉi tiu instituscio, por akceli la senŝarĝiĝon de la homaro delonge suferanta, afliktita de egoistaj kalumniantoj per malveraj diroj.

Ni respondas kun granda ĝojo iujn ajn demandojn pri ĉio ajn koncernanta Islamon, kaj pri kio vi deziras pluan informon.

La paco de Dio estu kun vi.

Mohamed Taŭfik Ahmed

"DAR TABLIEGH -EL- ISLAM"

Poŝtkesto 112, Kairo, Egiptujo.

TRADUKITA
DE
ELENO VINFERO

تحت الرسالة الإسلامية
الحمد لله أولا وآخرا